Somera festo en Jüterbog 2010

Kio devas okazi, ke esperantistoj el Berlino, Brandenburgio, Krimeo kaj Pollando survojiĝas por restadi kelkajn horojn en tiu pli ol 1.000 jaroj aĝa urbo?
Oni bezonas someron, bonan etoson kaj la agademon de la gastigantoj, familio Langer.
Kaj 16 homoj venis je la 21-a de aŭgusto. Unue nur okazis estrarkunsido de EABB kaj tamen oni jam povis esplori la belan kaj grandan ĝardenon.
Post multaj jaroj estis la unua somera festo ekster la tradicia Michendorf ĉar la ejo kun domo ne plu estis disponebla. Ankaŭ ŝanĝoj havas siajn bonaĵojn kaj do ni pli malpli rapide sukcesis trovi la ĝustan vojon al la brika strato (Ziegelstraße) 35.
Ho kaj kiel bonege familio Langer regalis la gastojn per la plej diversaj bongustaĵoj. Jam tuj post la estrarkunsido ni povis gustumi freŝan kukon kun kafo kaj teo.
Ankaŭ ni eksciis iomete pri la urbo de Jüterbog kaj eĉ sukcesis viziti la interesan kaj imponan preĝejon de Sankta Nikolao. Tiu estas konata al la kristanaro pro la leteroj de indulgenco, eldonitaj de Johann Tetzel. Videbla estas la tielnomita "Skatolo de Tetzel", en kiu estis kolektita la mono. Inter alie la afero kaŭzis la reformacion de la kristanismo, kiu komenciĝis per la 95 tezoj de Martin Luther, kiujn li najlis al la pordego de preĝejo de Wittenberg je la 31-a de oktobro 1517. Memkompreneble ankaŭ aliaj trezoroj estis videblaj. Sekvonta kulmino estis la vizito de la urbodomo, kie ni povis konatiĝi kun la ĉambro de la urbestro. Tre interesa memkompreneble ankaŭ estis la vizito de la urba biblioteko, kiu troviĝas en iama monaĥejo kune kun la urba muzeo, arkivejo kaj turista informejo. Tiu vizito kroniĝis per guteto de loka herba likvoro. Post la reveno en la "festejo" ni povis ĝui bone organizitan kradrostan eventon.
Kiam malheliĝis, ĉiuj ĉeestintoj estis pridemanditaj, kial ili okupiĝas pri Esperanto.
Bedaŭrinde estis necesa adiaŭi de Jüterbog kaj la gastamo de familio Langer. Multan dankon al ili pro ĉio.
Sed eble ne estis la lasta fojo, ke esperantistoj renkontiĝas okaze de festo en tiu urbo. Kial ne!?
Ronaldo

Jen ankaŭ kelkaj impresoj: http://www.ipernity.com/doc/31521/album/205933